

## **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2019-01-15 ĝis 2019-04-15.

### **Vivo de la Ligo; eventoj**

#### **70-jariĝo de ILEI**

Omaĝe al la jubileo, jam ekzistas kaj estas realigata la plano por la enhavo de IPR pri tiu memordato:

2019 № 1: artikolo pri la historio de la Ligo;

2019 №№ 2 kaj 3: tekstoj de diversaj personoj, kiuj agadis en la tri lastaj jardekoj kaj /au havis respondecojn en la Ligo;

2019 №4 provos prezenti la estontecon, la deziratan evoluon.

Fine de marto kreiĝis laborgrupo por nova komuna projekto de ILEI kaj TEJO. Temas pri serioj da prezentoj pri la Ligo omaĝe al ĝia jubileo, pri ĝia historio, gravaj eventoj ktp. por la plej vasta publiko en la Reto en iu ajn enhava kaj interesa formato. Pri tiu laborgrupo respondecas Elena Nadikova flanke de la Estraro. La laborgrupo estas malfermita por ĉiuj dezirantoj, kiuj estas bonvenaj kunlabori.

Survojas la laboro pri kolekto/ordigo/konservo de informo kaj dokumentoj pri historio de ILEI. Grandan helpon disponigas la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill, kiu estis la Prezidanto de ILEI en antaŭaj jaroj.

#### **La Estraro**

La 24-27-n de januaro okazis fizika estrarkunsido de la nova Estraro en Les Brenets, Svislando. Ĉeestis 3 estraranoj, rete partoprenis 3 aliaj. Ĝin partoprenis la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill kiel observanto. La laboro daŭris po ses horoj ĉiutage: 9-12, 15-18h kun reta kunsido kun la cetero de la Estraro je la 16-a horo laŭ svisa tempo. Estis traktitaj seriozaj aferoj rilate al agado de la Ligo; interalie estis ellaboritaj statutmodifoj, kontrolo kaj modifoj de diversaj regularoj de ILEI: Interna Regularo, Konferenca Regularo, regularo pri Honoraj Membroj. Plia temoj traktitaj:

- Diskuto pri problemoj kun Juna Amiko,
- Preparado al la 52-a ILEI-kongreso en Serbio.
- Sistemanalizo de la vivo de la Ligo;
- Evoluo de Eo-Instruista Trejnado (EIT);
- Evoluo de la preparlaboroj lige kun la eldonado de « Manlibro pri Instruado de EO»;
- Re prezentado de la Ligo ILEI okaze de la UEA-Estrarkunsido en Roterdamo en aprilo 2019; komence de aprilo la estraro modifis sian decidon kaj rezignis pri tiu reprezentado, cele al ebligi flugon de la estrarano pri KONGresoj al Kebekurbo en junio 2019 por prepare la Kongreson de 2020.
- Evoluo de la preparlaboroj por la ILEI-Kongreso en Ĉaĉak, Serbio, 2019;
- Evoluo de la esploroj por la ILEI-Kongreso 2020 en Kanado. Decido pri la kongresa temo;
- Starigo de la projekto «Flugiloj de interkultura vento»;
- Kreskigado de la Koleghelpa Kaso (KhK) per alvoko al donacoj kaj aldono de pliaj membroj en diversaj landoj, kie vivas izolitaj esperantistoj;
- Decido pri la teksto por Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro 2019 – «Super» de Hector Hodler, en rilato kun 2020, 100-jariĝo de lia morto”.

Aprile okazis fruktodona skajpkunsido de la Estraro. Ĝin partoprenis ankaŭ la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill. Estis pridiskutitaj kaj deciditaj gravaj demandoj: financa aspekto de la reldono de la Manlibro; la kongresoj en 2019 kaj 2020; kandidatiĝo de ANEB Burundo por Hamdan-premio de UNESKO por 2019.

Januare-febuare la Estraro kontrolis la protokolon de la komitatkunsido en Madrido rilate al plenumado de devoj kaj planitaj taskoj.

Februare-marte daŭris la detala revizio kaj kontrolo de ĉefaj dokumentoj de la Ligo fare de la Estraro kaj anoj de la Regulara Komisiono de ILEI. Temas pri kelkaj nekongruaĵoj, kiuj efektivigis dum la jaro kaj mankantaj eroj.

Daŭras la esploro pri arkivoj de ILEI. Unu parto kuŝas en Massa, Italio, sub la respondeco de la itala ŝtato. La Prezidantino Mireille Grosjean estas en rilato kun esperantistoj tie kaj petis, ke ili liveru liston de la dokumentoj. Ili raportis, ke la aliro al la dokumentoj estas bremsata fare de respondecaj oficistoj. Mireille proponis, ke ŝi kiel Prezidantino de ILEI skribu al la respondeculoj por peti liberan aliron al tiu trezoro. La italaj kolegoj bonvenigis tiun proponon. Letero tia estis sendita al Massa la 8-an de februaro 2019. Ĉu tiu elpaŝo solvos la obstaklon kaj ebligas travideblan kunlaboron?

Februare la Estraro revenis al diskuto pri nomkartoj por siaj membroj. La demando estas traktata laŭ la petoj de ILEI-landoj kiel Ĉinio, kie ILEI havas la plej multnombran sektion.

Februare-marte la Estraro pridiskutis la manieron por fari membrostatistikon, ĉar evidentiĝis diversaj embarasoj en ILEI-statistiko. Rezulte la Estraro ellaboris du ĝeneralajn principojn: principe membro pagas sian ILEI-kotizon laŭ la tarifo de la lando, kie li/ŝi loĝas. Tamen estas respektota la deziro de iu membro, kiu volas konservi ligan kun sia iama loĝlando, devenlando. Tion oni traktu aparte por ĉiu kazo. La principoj estis voĉdonitaj kaj akceptitaj ene de la Estraro. Julie la Estraro proponos ilin al la Komitato por aprobo.

Daŭras la kontrolo de la retejo de ILEI flanke de la Estraro.

La kasisto William Harris preparas la jarfinan financon raporton.

## **La Komitato**

Februare estis dissendita la protokolo de la komitatkunsido en Madrido dum la 51-a ILEI-kongreso. Marte okazis reta diskutfazo ene de la Komitato kaj poste aprobo de la protokolo.

## **Projektoj**

La Estraro decidis, ke enkadre de la ILEI-programo "Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro" la 15-an de decembro 2019 estos proponita omaĝe al jubileo de Hector Hodler (1887-1920) lia teksto "Super".

Daŭras la disvolviĝo de la nova projekto de ILEI "Unu leciono pri Esperanto por ĉiuj lernejanoj". La Estraro klopodas disvastigi la projekton pere de ĝia tradukado al naciaj lingvoj. Jam estas versioj en Esperanto, la franca kaj la itala lingvoj. Estas preparataj la rusa kaj angla versioj.

## **Kapabligo**

### **EIT – Esperanto-Instruista Trejnado**

Estas decidite, ke EIT-n dum la kongreso en Ĉaĉak gvidos Duncan Charters. Estas serĉataj kunordigantoj kaj instruistoj por lingvokursoj.

### **Reeldono de Manlibro pri Instruado de Esperanto.**

Survojas la laboro por reeldono de la Manlibro pri Instruado de Esperanto. Estis ellaborita definitiva buĝeto de la projekto, kiu inkluzivas: interkonsenton inter tri organizoj: ILEI, E@I kaj D-rino Katalin Kovats, taskodividon, finan buĝeton. La dokumento estis diskutita kaj aprobita ene de la Estraro. Laboras la skipo el Katalin Kovats, Stefan MacGill, Mireille Grosjean, Duncan Charters kaj aliaj aŭtoroj, Ivan Colling kaj lia edzino Rita kaj la helpantoj, grafikisto kaj desegnisto. Jam estas reviziita duono de la libro, estas kelkaj novaj artikoloj, senditaj de Katalin Kovats, estis elektitaj ŝablonojn por titoloj, alineoj k.a. Aprile estis decidita ene de la Estraro, ke mono venos el du fondusoj: Szerdahelyi kaj Interkulturo, kies saldoj ebligas investon. Poste la

gajnintaj sumoj revenos al la fondusoj. Meze de aprilo estis ellaborita detala plano de la enhavo de la Manlibro.

## Universitata agado

La 15-an de februaro kunsidis la laborgrupo de ILEI/ESF pri universitata agado: Angela Tellier, Renato Corsetti, Vicente Manzano-Arrondo kaj Radojica Petrović, al kiuj dume aldoniĝis ankaŭ Ivan Colling. La grupo analizis konkludojn de sia antaŭa, januara skajpkunveno laŭ la antaŭe dissenditaj notoj de Radojica. La grupanoj konstatis progreson ĉe iuj punktoj kaj analizis fareblojn ĉe la aliaj. Kiel kutime, estis farita protokolo.

La grupo subtenis la ideon de ILEI el la januara estrarkunsido de ILEI, kiun Radojica prezentis al la grupo, pri okazigo de la Dua Konferenco de universitatoj kie Esperanto kaj/aŭ interlingvistiko estas instruataj enkadre de ILEI-kongreso 2020, kun la ĉeftemo Interlingvistiko - paradigmoj, defioj kaj atingoj, kiu ja estas kerna ankaŭ por ĉi tiu laborgrupo. Kunside en Les Brenets la Estraro interkonsentis prizoni, ĉu la Universitata Komisiono kaj ESF pretas subteni tian planon. Nun Renato akceptis enketi prian sintenon, espereble subtenon, de la Universitata Komisiono, kaj Angela Tellier same ĉe ESF. Radojica disponigis al ili klarigan tekston pri la tuta plano. Estas esplorata ankaŭ ideo pri kunordigo de tiu konferenco kun la planata Nitobe-simpozio en Kanado, 2020.

Marte estis decidita, ke la komisiito de TEJO pri edukado (kaj samtempe observanto de TEJO ĉe ILEI kaj kunlaboranto de ILEI por junulara agado) Karina Oliveira eniros la Komisionon kaj la laborgrupon pri universitata agado por esplori pri eblecoj kaj manieroj kunagadi.

**LA 18-an de marto, 2019, okazis sekva skajpkunveno de la laborgrupo per Zoom.** Jen estas la detala komuniko.

**Temo:** ILEI-kongreso, Nitobe, LangFest 2020

**Partoprenintoj:** Universitata Laborgrupo: Angela Tellier (ESF), Radojica Petrović (ILEI-estrarano pri kongresoj), Vicente Manzano-Arrondo (ILEI), Ivan Colling (ILEI), Elisée Byelongo (ILEI), Renato Corsetti (ILEI), kaj Karina Oliveira (TEJO / ILEI).

Mark Fettes (UEA / ESF / CED), Mireille Grosjean (ILEI), Suzanne Roy (ILEI / LKK de UK).

**Atentigoj:**

- Kunlabori donas okazon rekoncepti Nitobe (MF).
- TEJO kunvenos en Nederlando (11-18 Julio, antaŭ la UK).

**Konferencdatoj kaj lokoj:**

- La ILEI-kongreso okazos en Kebekurbo antaŭ la UK 25 Julio – 1 Aŭgusto.
- Nitobe-simpozio okazos post la UK en la Universitato de Montrealo.
- LangFest (publika lingva festivalo) okazos paralele kun Nitobe.

**Temoj:**

- **ILEI-kongreso** - por nun, kandidatas la temoj:
  - Interlingvismo en la informteknologia epoko: paradigmoj, defioj kaj atingoj
  - Interlingvistiko: defioj kaj atingoj
  - La diverseco kaj tutmondiĝo de pedagogiaj paradigmojaŭ alia temo rilata al Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj
- Ĉiukaze, la ILEI-kongresa temo signifas subtenon al la klopodoj de la universitata laborgrupo kaj akcelilon de la universitata agado ĝenerale.
- **Nitobe-simpozio:** lingvo politiko, 75-jariĝo de UN, lingva diverseco (depende de trovo de subtenaj partneroj)

### **Kelkaj notoj pri universitata agado:**

Oni iomete diskutis pri restrukturigo de universitata agado (CED, ESF, ILEI, UEA) – nenio konkreta proponita krom la konstato, ke ne plu aktualas la iama intenco fondi komunan universitatan komisionon de UEA/ILEI.

Ĉiu agnoskis, ke ILEI havas la rajton (kaj devon) okupiĝi pri universitatoj same kiel pri lernejoj, inkluzive de okupiĝo pri interlingvistiko.

UEA observas kaj sekvas la laboron kaj iniciatojn de la laborgrupo, subgrupo de la ILEI-Komisiono pri Universitata Agado.

### **Kongresoj**

#### **La 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak, Serbio**

Survojas la laboro. Fine de marto estis decidita, ke, pro prokrasto de kelkaj informoj pri la kongreso, la malplej altaj kongreskotizoj validos ĝis la 15-a de aprilo.

Jam estas diskonigebla la aliĝilo tra kanaloj de ILEI. Estis ellaborita kaj voĉdonita la emblemo. Aperis La Unua kaj La Dua komunikoj. Survojas varba laboro. Estas preparita loĝmendilo kaj loĝoferto. La Estraro preparas la tagordon por la komitatkunsido. Unu el la demandoj estos statutmodifoj, ellaboritaj dum la estrarkunsido en Les Brenets januare. Estas dividitaj taskoj en preparado, pridiskutitaj kelkaj programeroj, nomoj de la salonoj. Komenciĝis preparado de diversaj programeroj fare de la partoprenontoj estraranoj.

La estrarano pri kongresoj Radojica Petrović diligente laboras kaj disponigas freŝan informon tra diversaj kanaloj. Estas preparata turisma programo. Estas publikigita rete kaj en IPR informo pri la loĝado kaj postkongresa transporto.

Aprile la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović kreis specialan diisendoliston de kongresaliĝintoj de Ĉaĉak, 2019, por faciligi la komunikadon.

#### **Venontaj kongresoj**

Daŭras preparlaboro por la ILEI-kongreso en 2020. La laborgrupo organizas skajpkunsidojn, dum kiuj oni traktas diversajn organizajn aferojn. La estrarano pri kongresoj Radojica Petrović laboras en kontakto kun diversaj instancoj kaj organizoj por pli bona preparado. Dum la skajpa estrarkunsido la 6-an de aprilo la Estraro definitive decidis pri la loko kaj datoj de la 53-a kongreso de ILEI en 2020. Tiu informo povos esti anoncita en Ĉaĉak. Jam estis rezervita ĉefsalono por tiu kongreso, laŭ la konsiloj de LKK-ontoj.

Estis pritraktita esplorvojaĝo de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović al Kanado. Estis decidite, ke li ne iros al la estrarkunsido de UEA en aprilo al Roterdamo. Tio ŝparos 200 eŭrojn kaj ebligos lian viziton al Kanado. La vojaĝo estas planata en junio 2019.

Krome, estas proponataj kaj diskutataj lokoj por estontaj kongresoj.

#### **Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj**

Fine de februaro Stefan MacGill dissendis enketilon al la 20 sekciestroj, kiuj ne ankoraŭ donis konsenton por la aperigo de siaj kontaktinformoj. Aprile li prezentis al la Estraro la rezultojn. ILEI havas momente 43 sekciojn, 10 reprezentantojn kaj 17 kontaktpersonojn. Entute 70. El ili nur 15 donis pruveblan konsenton. La Estraro insiste petas aliajn sekciestrojn, reprezentantojn kaj kontaktpersonojn reagi!

La Estraro decidis, ke ANEB Burundi denove kandidatiĝu por Hamdan-Premio de UNESKO.

#### **Koleghelpa Kaso**

Februare la nova esraranino pri financoj Karine Arakeljan kontrolis la staton de la kandidatoj por KhK por 2019. Poste okazis reta voĉdono kaj aprobo de tiu listo flanke de la Estraro.

## **Internacia Pedagogia Revuo (IPR)**

Sebastian CYPRYCH, la ILEI komisiito pri membroprizorgado, proponis novan sistemon por konsideri membrecon en ILEI kaj abonon por IPR. Li proponis unuigi limdatojn por membriĝo kaj abono de IPR. Tio multe faciligos la laboron pri membrostatistiko ene de la Ligo, kontrolon de dissendoj de la revuo, krome, reduktos elspezojn. Sekvis la diskuto kaj aprobo de la Estraro.

Daŭras la laboro por eldono de IPR por blindaj esperantistoj. La versio de IPR 2019/1 por nevidantoj, preparita de Jozefo Nemeth, jam ricevis pozitivan reagon. **Gratulojn al niaj samideanoj pro ilia sukcesa laboro!**

## **Juna Amiko (JA)**

Januare venis peto de Małgosia Komarnicka, la prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, ke la revuo „Juna Amiko” fariĝu Amaskomunikila Patrono de la SEPA EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ, ĉar la revuo estas konata de preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj. La organizantoj bone rekomendas la revuon dum la festivalo. **Gratulojn kaj dankon al Małgosia!**

Daŭras la traktado ene de la nova laborgrupo pri JA. La grupon eniras la Prezidantino Mireille Grosjean, la sekretariino Elena Nadikova, la kasisto William Harris, la estraranino Yuro Jung "Unika", la redaktoro Stano Marček kaj ILEI-ano Didier Janot. La ĉefaj esplordemandoj estas: utilo de JA por instruado de Esperanto, varbo de novaj abonantoj, “venko” de buĝeta defecito.

## **ILEI en la Reto**

La Estraro komencis grandan esploron pri la ĉefa komunikkanalo de ILEI – la paĝaro ilei.info. La unua etapo estas granda superrigardo flanke de la Estraro kaj teknika esploro pere de nia nova estraranino Unika.

Estas kreita nova Facebook-grupo cele al helpo por Esperanto-Instruistoj: <https://www.facebook.com/groups/303525510080377/> Bv, viziti kaj aktive partopreni!

## **Kunlaboro kun UEA**

Kiel jam kutime, ILEI uzas la kanalojn de UEA por disvastigo de informo pri la ĉi-jara ILEI-kongreso. Evoluas kunlaboro inter UEA – ILEI – TEJO rilate al ĉefaj eventoj en 2020. La 18-an de marto okazis komuna skajpkunsido inter 3 organizoj kaj la Universitata laborgrupo.

La Estraro komencis antaŭpreparon por Tago de Lernado dum UK en Finnlando kun sia komisiito Marija Belošević. Estis elektita la titolo por la Tago: “70-jara komunumo instruas por floranta (inter)kulturo”. Estas traktata la programo por la Tago, inkluzive omaĝon al 70-jariĝo de ILEI.

Survojas la laboro pri eldono de la prelegaro el Tago de Lernado dum UK en Lisbono. Iras traktado pri ISBN por tiu eldono kaj ligita kun tio loko por presado.

## **Kunlaboro kun TEJO**

Poiome disvolviĝas kunlaboro ILEI-TEJO. Februare estis akceptita, ke Karina Oliveira, komisiito de TEJO, estos kunlaboranto de ILEI respondeca pri junulara agado. TEJO interesiĝas pri partopreno en universitata agado, ĉar multaj TEJO-anoj apartenas al universitata medio pro sia lernado aŭ laboro.

Inter Karina kaj la Estraro komenciĝis pritrakto de kunagado rilate al organizado de la 52-a kongreso de ILEI en Serbio. Jam estas planitaj komunaj skajpkunsidoj.

### **Kontaktoj kun aliaj enmovadaj institucioj**

Januare venis peto de Małgosia Komarnicka, la prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, ke ILEI fariĝu Honora Patrono de la SEPA EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ, ĉar ĝi enskribiĝas en la celoj de ILEI. Ĝi estis dankeme akceptita, kiel antaŭe. La propono estis dankeme akceptita.

Februare estis pritraktita sekva reprezentanto de ILEI en la Fondumo Zamenhof. La Estraro decidis denove peti la nunan reprezentanton D-ino Ilona Koutny, kiu brile plenumas tiun taskon.

La prezidanto sendis salutmesaĝojn al IFEF-kongreso, al SATamikaro-kongreso, al Azia kaj Oceania Kongreso, al instruista kunveno en Brazilo, en Kubo kaj al du ĉinaj kunvenoj.

### **Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj**

Nova fakto: membreco de ILEI en la novjorka Komitato en CELL (Committee on Education, Learning and Literacy) de Unuiĝintaj Nacioj.

Daŭras la grava kunlaborado de ILEI-membroj kun la belga sekcio de AEDE (*Association Européenne Des Enseignants – Eŭropa Asocio de la Instruistoj*) danke al Germain Pirlot. Jen estas elŝuto el la trimonata informbulteno de AEDE (januaro-marto 2019): “En enkonduko, ni precipe dankas nian AEDE-membron Germain Pirlot, kiu dank’ al sia esperantista reto, havigas al ni sciigojn el landoj, pri kiuj ni ofte ne havas dokumentojn. Ĉi tiu ŝanco permesis al ni riĉigi niajn informojn kaj atestojn pri diversaj temoj en pluraj numeroj”. **Gratulojn kaj dankojn al nia belga kolego sinjoro Pirlot, kiu diligente informas per kaj pri Esperanto!**

La Estraro anoncas, ke la partopreno en la konkurso Poésie-en-liberté/Poezio tut’libera, kiu normale finiĝas la 1-an de aprilo, estas daŭrigita franc-lingve ĝis la 7-a kaj esperant-lingve ĝis la 30-a de aprilo.

### **Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI:  
Elena Nadikova  
Prezidanto de ILEI:  
Mireille Grosjean  
2019-04-15